„Kuraĝe antaŭen tra la mondo!“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Abonprezo (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, duongebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sfr. 4.25 (9 resp. kup. poŝtaj); ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. Leteradreso: Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

Jaro 2 (139) Korneuburg ĉe Wien, la 5. februaro 1937. 14. jaro

Al Aŭstrio por vintrosporti!

Nia Aŭstrio, en alilandaro tiom bone konata kiel vojaĝlando, belega dum ĉiuj jarsezonoj, allogas ĉiuvintre ĉiam denove la sportulojn el Tuteŭropo kaj eĉ el transoceanaj landoj. De ĉie venas la homoj al nia lando en la koro de Eŭropo, por aŭ lerni aŭ praktiki la diversajn specojn de sporto.

Ĉiu aŭstria Federacia Lando posedas vintrosportejojn kaj ĉie la fremdlandano renkontas la famanan gastamon kaj la ĉarmon de la aŭstria loĝantaro.

Komforton oni trovas en famaj altmontaj hoteloj, en soleco vi povas pasigi viajn feriojn en rifuĝejoj ankaŭ en la plej altaj kaj malaltaj regionoj. Kiu ne ŝatas grimpadon, atingos la elirpunkton de grandiozaj glitkuradoj per unu el la multaj dekunu kablofervojoj. La bona etoso de niaj skikabanoj, ilia granda nombro, la vojaĝoservo de niaj fervojoj kaj la malaltaj prezoj de la restadejoj, ĉio tio igas la restadon en Aŭstrio tiom agrabla kaj ŝatata.

Jam en la proksimeco de Wien estas multaj vintrosport-eblecoj kaj ankaŭ en la aliaj federaciaj landoj de nia patrujo.

Plej multe praktikata estas la skiado kaj la belegaj regionoj en Niederösterreich estas Semmering, kie nuntempe la Duko de Windsor praktikas la belan blankan sporton, Schneeberg kaj Rax-alpo; proksime de Wien Kahlenberg, Leopoldsberg kaj Wiener Wald; en Oberösterreich Dachstein kaj Höllengebirge (la plej bela kablofervojo ekzistas supren); en Steiermark la stiriaj Erzalpoj, stiria Salzkammergut kaj la regiono de Mariazell (kablofervojo al Bürgeralpo); en Kärnten ĉe Mallnitz kaj la regiono de Grossglockner kun Heiligenblut. Salzburg estas vere lando de skiisto kaj tuta Tirol kun Vorarlberg lia paradizo. Sankt Johann, St. Anton, Zürs, aŭ en Igls, kie

Rondrigardo de supro. Foto Leo Rosenberg, Oe. V. W.

ĉijare la duan fojon la Reĝino de Nederlando praktikas kun plezuro la vintrosporton, Kitzbühel, kie lastjare estis Princo of Wales, kaj multaj aliaj estas famaj.

Sur la grandiozaj deklivoj de Arlberg estiĝis la nova, moderna arto de skiado, kiu kontraŭe al la maniero en la nordaj landoj, praktiki la skiadon kiel kuradon sur longaj distancoj sur ebena tereno, utiligas la skiojn por montekskursoj kaj kiu trovas en rapidegaj malsuprenglitadoj sur vastaj alpodeklivoj la plej belan ĝuon kaj feliĉigan senton de libereco, kvazaŭ solvita de ĉia pezeco kaj ligiteco surteraj.

Aŭstrianoj estas la klasikuloj de tiu moderna skiado, antaŭ ĉiuj la mondfama skiinstruisto Hannes Schneider el St. Anton sur Arlberg, malgranda loko, nun modelo por skilernejoj en tutmondo. Hannes Schneider disponigis artikolon pri „Skiinstruado kaj skiinstruisto“, el kiu ni ĉerpas jenon:

Dum la lastaj 10 jaroj la skisporto ege ekfloris. Ĉie oni instalas skilernejojn, sed ofte oni malatentas, ke eĉ bonega skiisto ne devas kapabli instrui la skiadon al aliaj. Oni ofte elektas eminentan konkurskiiston sed ne pedagogon. Sed laŭ mi la skiinstruisto devas esti sisteme edukita kaj por tio necesas jaroj. La arto de bona instruado dependas de diversaj kondiĉoj: pedagoga talento, observemo, ĝusta modelo kaj tre multe da pacienco kaj laŭmetoda procedo en la instruado.

Kiu instrumetodo estas la plej ĝusta? Dikajn librojn oni povus skribi pri tio. Sed laŭ mi oni instruas laŭ metodo, per kiu mi kiel eble plej baldaŭ kaj certe perfektigu la lernanton tiamaniere, ke li kapablas poste sola perfektiĝi. Do kiel eble plej solida kurado sen faloj, kurado eleganta kaj rapidkurado.

Aliaj specoj de vintrosporto: glitkurado, veturado per apartaj glitveturiloj (Gassel), rodli, bobveturado ktp.

Richard Kreutel.

Esperanto en la servo por la patrujo.

Sub ĉi tiu devizo nia gazeto „Aŭstria Esperantisto“ jam de jaroj laboras kaj nun por pli forte daŭrigi ĉi tiun celon, fondis „**Esperanto-Varbadservon por Aŭstrio**“.

Per tio ni montris kaj montros al ĉiuj niaj instancoj kaj al la granda publiko, kiom nia helplingvo povas servi al nia patrujo, kaj per tio ni jam sukcesis atingi rekonon de la Esperanto-movado diversflankan.

Ni daŭrigos ĉi tiun laboron kaj petas subtenon de niaj enlandaj s-anoj kaj helpon de la alilandaj per publikigo de niaj artikoloj (ankaŭ parte) en la gazetoj.

Jam nun koran dankon: La eldonanto Steiner.

Parta resono pri la Esperanto-Varbadservo.

Ons. pr. de Federacia Prezidanto. 455

Al la gvidanto de E.-varbadservo por Aŭstrio
Wien.

Vi havis la afablecon transdoni al s-ro Federacia Prezidanto numeron de la unua numero de la gazeto „Aŭstria Esperantisto“ kiel ankaŭ Esperanto-ŝlosilon. S-ro Federacia Prezidanto rigardis ilin kun intereso kaj kompleze dankigas vin pro la ĝentilaĵo, per la transsendo farita al li.

Huber.

Prezidejo de Ministerio por Instruado.
Sekcia kons. d-ro J. Musil. Wien, 13. januaro 1937.

Tre estimata s-ro kortega konsilisto!

Laŭordone mi transsendas la plej bonan dankon de s-ro Instruministro pro la Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio, sendita al li.

Kun la esprimo de la plej alta respekto

Musil.

La Statsekretario en Federacia Kancelierejo kaj Generala Sekretario de Patriota Fronto.
Wien, 15. januaro 1937.

Al la Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio!

Por la afable alsendita unua numero de la Esperanto-gazeto bonvolu akcepti mian plej bonan dankon kiel ankaŭ por la tre instrua libreto „Esperanto-ŝlosilo“.

Kun la esprimo de plej bona altrespekto
Front Heil

Guido Zernatto.

Urbestro de Wien, iama vickanceliero Richard Schmitz telefone dankigis pere de magistrata ĉefkons. d-ro Asperger pro la aranĝo de Varbadservo kaj gratuligis.

Prezidejo de Ministerio por Instruado.
Gazetarref. d-ro Th. Veiter. Wien, 19. januaro 1937.

Tre estimata s-ro kortega konsilisto!

S-ro la Federacia Ministro por Instruado d-ro Pernter ordonis min, esprimi al vi lian plej komplezan dankon pro la transsendo de la unua numero de la Esp.-Varbad-gazeto por Aŭstrio. Speciale s-ro la Federacia Ministro dankas al vi pro la sciigo, ke vi estas preta ankaŭ disponigi vian organon en la servon de la aŭstria publika instruado kaj de la ŝtataj teatroj. Koncernaj artikoloj laŭbezone estos sendataj al vi.

Kun la esprimo de la plej alta respekto
d-ro Veiter.

La Prezidejestro de Federacia Kancelierejo. Wien, 14. januaro 1937.

Tre estimata s-ro Kortega Konsilisto!

Por la afabla transsendo de la unua numero de Aŭstria Esperantisto mi havas la honoron esprimi mian plej bonan dankon.

Kun la esprimo de mia plej alta respekto
via sindona

Chavanne.

Leopoldine Miklas. Wien, 17. januaro 1937.

Tre estimata s-ro kortega konsilisto!

Multan dankon pro la afabla alsendo de via Esperanto-gazeto kaj de la malgranda Esperanto-Ŝlosilo-vortaro!

Ke vi en via gazeto bilde kaj vorte menciis min kaj mian edzon en afabla maniero, mi rigardas kiel specialan kompleze ĝentilaĵon, por kiu mi kore dankas.

Kun la plej bonaj salutoj altestime

Leopoldine Miklas.

(La letero estas skribita de la edzino de nia Federacia Kanceliero mem.)

Patrolta Fronto
Generala Sekretariejo. Wien, 14. januaro 19

Tre estimata s-ro Kortega Konsilisto!

Multan koran dankon pro via afabl saluto de 9. januaro kaj pro la aldonit numero de via gazeto.

Mi nur jus revenis el ČSR kaj hav multan laboron, pro tio mi nur pova respondi mallonge.

Kun la plej bonaj salutoj
via sindona

Federacia gvidistino de Virinrefera
(princino) Fanny Starhemberg.

Josefine Schmitz. Wien, 15. januaro 19

Tre estimata s-ro Kortega Konsilisto!

Pro malsano mi nur hodiaŭ povas at la ricevon de via ŝatata letero kun pro numero de via ŝatata gazeto kaj aldonaj por kiuj mi plej bone dankas.

Mi deziras al la celadoj de la Esperan Varbadservo tre bonan sukceson kaj sign kun la esprimo de plej alta respekto

Josefine Schmitz.

★

Oficejo de la Federacio Kanceliero. 10. dec. 19

Al Aŭstria Esperanto-Asocio,
Wien, I.

S-ro Federacia Kanceliero dankas kompleze por la afabla transsendo de raporto pri 28-a Universala Kongreso Esperanto, en kiun li kun intereso rigard kiel ankaŭ por la du libroj kaj la arĝen Kongres-insigno, kiun li volonte akcept

XXIX-a Jubilea.

Varsovio, 7.—15. aŭgusto 1937.

La Prezidanto de Pola Republiko Prof. d-ro Ignacy Moschicki akceptis la Altan Patronadon de 29-a.

Loka Kongresa Komitato:

Honora Prezidanto: Prof. d-ro Odo Bujwid, prez. de Pola E.-Delegitaro.

Prez.: vicdir. Bronislaw Bohdan Wyszynski.

Viceprez.: d-ro Wilhelm Róbin, Kazimierz Zajaczkowski, Leon Klimecki kaj Stanislaw Karolczyk.

Generala sekr.: Aleksander Hartmann.

Sekr.: Lila Tazbirowa, Jan Zawada.

Kas.: Stefan Lubliner, Halina Weinstein.

Komitatanoj: Mieczyslaw Kaus, Borys Strelczyk.

Adreso: Warszawa, Chmielna 28 m 8.

Aŭstria E.-Asocio aranĝos **karavanon.** Kelkaj s-anoj jam aliĝis. Eksterlandanoj, trapasontaj Aŭstrion, povos aliĝi de Wien kaj ĝui la rabatojn.

Kongreskotizoj:

1. membro	aŭ ŝ	46.60
2. familiano	„ „	29.30
3. gejunuloj ĝis 18-jaraj	„ „	18.70
4. helpkongresanoj	„ „	18.70

Frupagantoj (1—3) **ĝis 15. febr.** al Aŭstria E.-Asocio **30%** rabaton, ĝis **30. aprilo 20%** rabaton.

La **voksignalo** por ĉiu esperantisto estu: **„Neniu manku en la jubilea Kongreso“!**

Granda sukceso estus, se partoprenos 50.000 esperantistoj el la tuta mondo! Kaj poste radio disaŭdigos: „Eksterordinara en la historio de internaciaj kongresoj: Kongreso de E. en Varsovio kun 50.000 kongresanoj el la tuta mondo“; „Enkonduku E-on en la lernejon“, „Esperanta Ligo de Nacioj“. Kunhelpu!

Propaganda materialo: por prelegoj pri Polujo kaj Warszawa nun estas preparata (lumbildoj kun teksto) kaj sendota al mendontaj grupoj, kiuj deziras aranĝi tiajn prelegojn.

Murafiŝoj: Senpage sendotaj de LKK.

Fervojrabatoj: por Polujo certigataj. Aliaj detaloj sekvos.

Sporta sekcio: Sporta Sekcio fondita por aranĝi dum La Jubilea sportludojn esperantistajn en fakoj piedpilka, malpezatletika, tenisa ktp. — se sufiĉaj sportaj s-anoj sin anoncos.

Honoriga Stelo: Intencata inda honorigo de ĉiuj Esperanto-veteranoj kaj pioniroj.

Aliĝis pli al 100 personoj el 16 landoj.

Kelkaj gravaj aranĝoj intencataj, kiel **ekskurso al Byalistok,** la naskiĝurbo de nia Majstro kun **inaŭguro de monumento.**

Ni aranĝos helpe de Oesterr. Verkehrsbureau **karavanojn** al **Paris** (Intern. Konferenco, Pentekoste) kaj **Varsovio** (29-a Univ. Kong. de Esp.)

Se proksimume 30 personoj partoprenos: **Wien**—Oderberg — Kattowitz—**Warszawa** kaj **returnen** al Wien (kune en grupo) rapidtrajno 3-a klaso aŭ ŝ 71.40.

Wien — Salzburg — Buchs — Zürich Basel — **Paris** kaj **returnen** al Wien (ku en grupo) rapidtrajno 3-a klaso aŭ ŝ 130. ĉe unuopa reveturo ŝ 141.60.

La restadkostoj por Warszawa kaj Pa estos sciigataj en la venonta numero.

Sinanonco kaj informoj ĉe **Oest. Verkeh bureau,** Wien, I., Friedrichstraße 7.

Ankaŭ alilandanoj povas partopreni.

Esperanto-Hejmo en Aŭstrio

Dum ĉiuj sezonoj al Aŭstrio.

Ni intencas plej baldaŭ konigi al esperantistaro tutmonda, ke ni disponig al ĝi belan kaj agrablan hejmon en la p bela parto de nia Aŭstrio, en Supra Aŭstr ĉe unu de ĝiaj belaj lagoj enmeze de al montoj.

Necesaj antaŭkondiĉoj, plenumotaj: Be hejmo, esperantistoj je dispono, mala prezo, bona kuirmaniero, belega ĉirkaŭaj sporteblecoj (montgrimpi, naĝi, bani, ren tenisi, dumvintre skii, rodli, glitveturila ktp.). Je via dispono estos urbeto ku diversaj, amuzajoj, lago kun vaporŝip altaj montoj kun grandioza kablofervoj — multaj esperantistoj.

Jam nun rezervigu — alilandanoj k aŭstrianoj — someran libertempon, ank antaŭ aŭ post la Jubilea, por restado en Esperanto-Hejmo en Aŭstrio.

Detaloj en marta numero.

Ĉefepiskopa Katedrala kaj Dioceza Muzeo en Wien.

D-ro Hermann Göhler, membro de Kuratoraro de la Muzeo,
komisiite de Lia Kardinala Moŝto **d-ro Theodor Innitzer,** ĉefepiskopo de Wien.

La du tipoj de katedrala kaj dioceza uzeoj estas unuigitaj en Wien. La antaŭ- de la katedrala muzeo estis la katedrala rezorejo kaj ĉe la antikvaj katedraloj ĉi tiu ansiro de trezorejo al muzeo ofte tre frue j tute organe povis okazi. En Aŭstrio kun por la oriento karakteriza malfrua evo- ĝo mankas preskaŭ entute la potencaj iskopejoj kiel en la okcidento kaj pro tio nkaŭ la katedralaj muzeoj. En Wien oni is la komencon, kiom eble plej multe post-

iskopa kurb-bastono el 1520 (Katedralo Sa. Stefano).

ri kaj antaŭokuligi la katedralon de Stefano en ĉiuj ĝiaj esencaj partoj de la storia ekzistado. En Aŭstrio pli multe tas reprezentata la tipo de dioceza muzeo, u provas sisteme kolekti tiun valoran klezian havaĵon, kiu en la diocezo ne plu tas uzata dum la kulto aŭ en la origina ko estas en danĝero aŭ ne sufiĉe bone nservata.

Kiel nura dioceza muzeo ĝi jam estas pro- itata de kardinalo-ĉefepiskopo Josef Oth- r von Rauscher (1853—75), kvankam oni nsis pri muzeo, kiu servu kiel instruko- kto por la pastroteologia kaj eklezia art- storia nstruado de la plipostaj pastroj. el heredaĵon el la tempo de kardinalo auscher la muzeo nun posedas tre valoran Kasel" el la fino de la mezepoko, kies ŝtofo las same arteca kiel la altreliefbrodaĵo.

Kiel ĝuste la epoko de kardinalo Rauscher estis fora de la ideo de katedrala muzeo, pruvas la fakto, ke oni jam tiam transdonis valorajn artaĵojn el la katedralo al Vien-aj Urbaj Kolektoj, kie troviĝas granda kolekto de „Antikvaĵoj de la arto kaj historio de Katedralo de Sa. Stefano", kiu pli bone havus sian lokon en Katedrala Muzeo. Ĉi tiujn aferojn ĉiu devas pripensi, kiu rigardas la en 1933 inaŭguritan Katedral- kaj Dioces-Muzeon.

En ĝi estas impona vico da plastikaĵoj de la katedrala konstruado el la komenco de la 14 jc. ĝis la frurenesanc-epoko. Ankaŭ la ekspozo de la historiaj skribaĵoj provas montri la historion de la episkopejo depost la fondoprovoj en la 13. jc. ĝis la eknomigo je ĉefepiskopejo en 1722. Speciale riĉe ilustrita estas la historio de la trezorejo, fondaĵo de duko Rudolph IV. (mortinta 1365) kaj la du plej malnovaj inventarlistoj el la 14. jc. raportas pri la valoraĵoj el ĉi tiu epoko. El la trezorejo ankaŭ venis la tiam-epoka porteto de la duko, unu el la plej valoraj juveloj de la muzeo. El la sama epoko estas du unikaj orientaj boteloj, internacie famaj, kiuj lastjare estis rigardeblaj en la islama ekspozicio en Wien. El la ĉerko de duko Rudolph estis prenita altvalora brokatŝtofo el la unua duono de la 14 jc., kiu estas de persa deveno kaj estiĝis sub ĉina influo. Dokumento el 1359 kun la subskriboj de la dukaj geedzoj rilatas al la metado de la unua ŝtono por la pligrandigo de la katedralo.

Aro da verkoj el la barokepoko venis el la katedralo en la muzeon, ne nur bildoj de majstroj Spillenberger, Altomonte, Unterberger kaj Rottmayer, sed ankaŭ laboraĵoj de oraĵist- kaj teksaĵ-arto. La ĉefepiskopejo transdonis grandan nombron da bildoj de romantikuloj kaj nazaretanoj sed ankaŭ mezepokajn bildojn surtabulajn kiel du tabulojn de altaroj el la 15. jc., originaj el la laborejo de Hans von Tübingen, kaj la faman altaron de Ober St. Veit el la laborejo de Nürnberg-a majstro Hans Leonhard Schäuffelein.

Ankaŭ kelkaj preĝejoj el la diocezo donacis valoraĵojn ekz. la paroĥa preĝejo en Zistersdorf la „Vinber-di-patrino"-n de Lucas Cranach signitan verkon, kaj Sa. Anna en Wien lignoplastikaĵon de Nürnberg-a majstro Veit Stoss. Burgo Kreuzenstein donacis vespro-bildon el kalkŝtono el la frua 15. jc.

La Vien-a plastik-arto de la frurenesanc-epoko el la komencinta 16. jc., ofte reprezentata kelkaj Vienaj preĝejoj per tombmonumentoj, trovis en la muzeo kulturejon. En printempo de 1934 Sa. Andreo-kapelo en la ĉefepiskopa palaco, deveninta el 1638, povis esti aligita al la muzeo. Konservante la sanktan karakteron kaj la laŭliturgian uzeblecon de ĉi tiu nobla frubaroka ejo oni povis enmeti tri frurenesancajn altarojn el sabloŝtono el la komenco de la 16. jc., kiuj unue estis en la preĝejoj Sa. Augustin kaj Sa. Peter, en la epoko de altbaroko venis en la tombajn kelojn, de kie ili venis en la muzeon. En ĉi tiu kapelo la muzeo posedas ejon, kian similan oni nur renkontas en Fugger-kapelo en Augsburg.

Per la ekipado de Sa. Andreas-kapelo kaj la instalado de la muzeo en kvin salonegoj de la ĉefepiskopa palaco, kiuj antaŭe servis por la reprezentaj devoj de la ĉefepiskopoj, la muzeo ricevis sian hejmon en la centro de Viena malnovurbo en plej proksima najbareco al la katedralo. Jam dum la fondo de la muzeo oni intencis aranĝi apartan sekcion por religia popolkono kaj popolarto, sed nur povis esti efektivigita la

Sankta Maria kun Jezuo-Infano ĉirkaŭ 1430 (Paroĥejo Thernberg).

10. junio 1936 sub la titolo: „Kolekto por germana religia popolkono." Tio nur estis ebla per tio, ke la Viena universitata docento d-ro Rudolf Kriss deklaris sin preta, transporti sian grandan kolekton al Wien kaj disponi ĝin kiel parton de la muzeo. Per la afabla preteco de la kompetentaj instancoj tri grandaj salonegoj estis disponigitaj por ĉi tiu celo en la kadro de Etnologia Muzeo en Neue Burg. La kolekto de docento Kriss en sia speco estas la plej granda religia-etnologia kolekto sur sudgerman-aŭstria tero. Per internaciaj komparobjektoj kaj la starigo en la kadro de Etnologia Muzeo la kolekto de docento Kriss plej bone efikas enmeze de la kulturmonumentoj de la aliaj religioj de la mondo.

Katedrala kaj Dioceza-Muzeo povas esperi, ke ĝi estas sur bona vojo, efektivigi la al si metitan celon.

Reinhardt-Seminario en Schönbrunn.

Originala artikolo por AE de d-ro Hans Niederführ, gvidisto de Reinhardt-Seminario.

Instituto por la universala sinperfektigado al teatroprofesio, ankaŭ ekster Wien kaj Aŭstrio konata, estas Viena Reinhardt-Seminario. Ĝi havas la avantaĝon situi ekster la vera grandurbo, en unu el la plej belaj vilao-antaŭurboj de Wien, en la idilia



El „Intrigo kaj Amo" de Friedrich Schiller (finakto) De md.: Huhn, Skodler, Breuer, Schreiber, Popescu.
Foto: Max Fenichel.

trankvilo de parko kaj kastelo Schönbrunn. Ĉi tiu kastelo de Maria Theresia, konstruita laŭ planoj de la fama aŭstria barok-arkitekto Fischer von Erlach gastigas en la dekstra flankparto de la nobla kastelkorto unu el la plej ĉarmaj salon-teatroj en la tuta mondo.

En 1744 unue konstruita kiel itala loĝia teatro ĝi estis kelkajn jarcentojn poste alikonstruita kiel postklasika franca balkonteatro. Preskaŭ ne alia scenejo havas simile brilan tradicion. Josef II. kaj Maria Antoinette kun siaj gefratoj aktoris kaj dancis ĉi tie antaŭ sia imperiestra patrino. Napoleono ĉi tie aktorigis la faman Talma. Ĉiuj eminentuloj de la malnova Burgtheater aktoris ĉi tie je honoro de altrangaj gastoj de la aŭstria kortego.

Post 1918 la iama privata teatro de la imperiestro estis malfermita al la publiko. Unue mallongan tempon kiel filia scenejo de Burgtheater, poste uzita kiel salon-operejo, ĝi estis tramsdonita en novembro 1928 al profesoro Max Reinhardt por fondo de teatro-seminario.

En la soleco de la kastelregiono maturiĝantaj talentoj sin preparas por sia artista kariero. Granda nombro de junaj homoj el la malnova kaj nova mondo jam frekventis ĉi tiun instituton kaj kelka nomo de iamaj frekventantoj jam akiris rangon kaj reputacion en la vasta publikeco.

La labormetodo en ĉi tiu instituto estas kvazaŭ mezaĵo inter instruinstituto kaj praktika teatro. La studentoj aŭskultas pre-



Kastelteatro en Schönbrunn: Interna aspekto.
Foto: Franz Löwy.

legojn, partoprenas instrulecionojn de dramaj komenciĝkursoj, ekzercas kun siaj parol- kaj voĉ-instruistoj tonformadon kaj elparoladon kaj sin movas en ritma takto dum la lecionoj de la korpa ekzercado. Sed aliflanke ili ne nur estas aktoroj en publikaj kaj nepublikaj prezentadoj, ili ankaŭ estas siaj propraj reĝisoroj, dramaturgoj kaj scenej-arkitektoj.

La plej esenca kaj plej bela por ili estas en tio, ke plej larĝa ebleco estas transdonita al ilia iniciativo. Ili povas mem proponi teatraĵojn por prezentado. Ne malofte okazas, ke teatraĵoj estas de ili novtradukataj, prilaborataj aŭ en specialaj kazoj eĉ transpoematoj. Ĉe la disdono de la roloj ankaŭ la opinio de la lernant-reĝisoroj estas atentata. Ĉi tiuj ankaŭ direktas la provprezentadojn, kiuj nur estas kontrolataj kaj korektataj de la docentoj. Ankaŭ la scenejbildo estas formata de la studantoj. Ne nur en skizoj; ili ankaŭ devas zorgi pri la efektivigo, kiu okazas en la laborejoj de la instituto, kalkuli la budĝetojn kaj superi ĉiujn malfacilaĵojn de la praktika funkciado. La aranĝo de la kostumoj kaj maskoj, la lumigadprovoj, ĉio tio estas afero de propra agado por la studantoj. Kiam la ĝeneralprova prezentado pasis, kiu estas grava agado, tiam malfermiĝas la pordo de la teatrojuvelo en Schönbrunn kaj la publiko kun la gazetĵurnalistoj ĉeestas ĉiujn prezentadojn.

Aparte de ĉi tiuj grandaj prezentadoj sur la scenejo, la instituto disponas ankaŭ pri



Studantaj aktoroj laboras en la laborejo.
Foto: Franz Löwy

malgranda salonteatro, kie je posttagmezoj kaj vesperoj, je vintrodimanĉoj mallongaj unuaktaĵoj kaj scenoj estas prezentataj antaŭ amikoj kaj parencoj de la lernantoj. Ĉi tiuj publikaj ekzercadoj havas la ĉarmon de speciala intimeco kaj la avantaĝon, ebligi oftan prezentadon al la lernantoj kaj pro tio multe atribui al la plialtigo de ilia metio certeco.

Sed ankaŭ pri diversaj specialkursoj Seminario disponas. Jen oni ekzercas ankaŭ la parolmanieron antaŭ la mikrofono kaj preparon al radio kaj sonfilmo. La instituto havas propran radioinstalaĵon, kiu ebligas la paroladon antaŭ la mikrofono en fermita ejo, dume la aŭskultantaro en la aŭditorio povas sekvi la prelegojn kaj aŭdi la kore-



Provprezentado por „Somernokta revo" de Shakespeare laŭ la enscenigo de Max Reinhardt. Malsupre: d-ro Hans Niederführ, supre de md.: F. Fürst, d-ro Netolitzky, Ing. Horner, H. Grathwohl, Kurt Kasznár, Miłosz Sperber, Fritz Klingenbeck.
Foto: Franz Löwy.



Aktoroj rolas en promenejo dum teknikaj laboroj sur scenejo.

don de la instruanto. Ankaŭ internaj adioprezentadoj estas tiamaniere eblaj.

Ne malalte taksebla moderna rimedo de rta instruado estas la surparolado de grafondiskoj. Estas tute speciala kaj pedagogie grava impreso, kiun la unuopa ricevas, se li povas aŭskulti la unuan fojon sian propran voĉon.

Speciala fako de la instituto okupiĝas pri teoria kaj praktika edukado de scenejaj rkitektoj. Krom specialhistorio de la omenco ĝis la nuntempo pri konstruma-ero, vestaĵoj kaj ilaroj, ankaŭ la tuta kniko de la scenejo kaj de la teatro ne ur estas instruata, sed ankaŭ ekzercata kaj anipulata en la propra teatro kun moerna lumigadinstalaĵo. La sceneja arkitekto avas okazon, vidi la avantaĝojn kaj nekonntigaĵojn de siaj ideoj en la praktika gado sur la scenejo. Li estas devigata, onsideri la dezirojn de la aktoroj kaj de aj reĝisoroj. Li ekscias ĉiujn malfacilaĵojn, uj estiĝas el tio, kaj devas unue kalkuli un la faktoj de la budĝeteblecoj. La kono aj la prilaborado de la materialo, la penado kaj kaŝado, ĉio tio devas esti lernata. ni ne devas forgesi, ke en ĉi tiuj laboroj nkaŭ la arkitekturo de la filmo devas esti onsiderata. Lernintoj de la instituto ankaŭ m havis vere grandiozajn sukcesojn sur kampo de l' filmo.

Tiel ekde la komencanta aŭtuno ĝis la rmega somero diligente kaj kun sindediĉo stas laborata, ofte de la frumateno ĝis la alfruaj noktohoroj en la lernejo kaj ekzercsur la scenejo kaj en la laborejo. Sed am la mezo de l' somero estas veninta, m instruistoj kaj lernantoj ferias kaj anda parto de la junaj homoj veturas al lzburg, kie propra domo gastigas la minariistojn. Ĉi tie la studantoj povas natiĝi kun plej bona teatro en plej kontrita teatro-aero kaj-ĉirkaŭaĵo; ili partoenas en la agado de la festludoj, kelkaj eĉ vas kunaktori en pli malgrandaj roloj en iu" kaj „Faŭst". Post la fino de la festdoj parto de la seminariistoj revenas al hönbrunn, la aliaj iras en la mondon, r praktiki sur pli grandaj aŭ pli malrandaj scenejoj, en filmo aŭ radio tion, on ili lernis. Kaj la Seminario restas por uj ĉiama centro.

Informojn volonte donas „Reinhardt-Seminario, Wien, XIII., Schönbrunn. Red.

Radio-Wien.

un lundon E.—kurso 15 h 40—16 h.

2. februaro: reg. kons. **Fritz Stengel** pri „Kvina datreveno de porlernejaj radiodissendoj" (El radio-parolado de Ministro por Instruado d-ro Hans Pernter kun ties permeso).

9. februaro: **Ernst Werner** pri „1937, luktado kontraŭ la senlaboreco en Aŭstrio" (Parolado disponigita de Ŝtaatsekretario Hans Rott).

0. marto: Konsilisto de Urbo Wien **Mina Wolfring** pri „Porpatrina helpverko de Patriota Fronto".

4. marto: **Maria Letfuhs** „Kial dum printempo al Aŭstrio?".

„Tra Aŭstrio per aŭtobuso", vojaĝlibro, 0-paĝa, tra la plej belaj partoj de Aŭstrio un 70 bildoj, nur 3 resp. kup.

La novkonstruo de Viena Reichsbrücke.

Originala artikolo por AE de inĝ. E. H. Jordan, „Bundeskommissariat für Heimatsdienst" en Federacia Kancelierejo.

La evoluiĝo de la aŭstriaj ŝose-kaj fervojretoj iaŭ la ĉiam pli kreskantaj postuloj de la moderna trafiko, ĝenerala pli granda uzado de la trafikvojoj kundecidis en 1933, anstataŭi la malnovan „Reichsbrücke", kiu ne plu respondis al la trafikpostuloj, per moderna novkonstruaĵo.

La ponto kondukas ĉe Wien trans Danubo-n kaj la apudan inundo-regionon, interligas la II-an kun la XXI-a komunumdistrikto kaj havas tre grandan transittrafikon, speciale dum la somermonatoj, ĉar la tuta frekvendantaro de la urbaj banejoj, je belaj dimanĉoj ofte pli ol 250.000 personoj, uzas ĝin.

Post ekzameno de multaj projektoj la nova ponto estis konstruata kiel pendanta kaj estas en sia speco kun aperturo de 244 m en la meza kaj po 62 m por la flankaj partoj la tria ĉenponto laŭ la longeco sur la eŭropa kontinento, kun 1230 m. Ĉi



tiu konstrumaniero estis elelktita pro tio, ĉar ĉe ĉenponto la pieroj, malhelpantaj la surriveran trafikon, forrestas, la veturvojo povas esti pli alten lokata kaj ankaŭ la arkitekta aspekto adaptiĝas mirinde en la kadron de la pejzaĝa ĉirkaŭaĵo.

Grava kondiĉo devis esti plenumata. La tre vigla trafiko trans Reichsbrücke ne povis esti interrompata kaj tamen la malnova ponto devis esti forigata, por doni lokon al la nova. La arto de aŭstriaj teknikistoj kaj la kapabloj de iliaj laboristoj tamen ebligis aranĝon, kiu kaŭzis en la tuta mondo merititan admiron. La malnova ponto estis en sia tuta longeco de pli ol 340 m ŝovita 27 m laŭfluen, la strataliĝoj, relinterligaĵoj alilokitaj kaj post interrompo de 24 horoj la trafiko denove povis transflui.

Depost 1934 oni laboras en la konstruado de la nova ponto, majstroverko de aŭstria tekniko, Preskaŭ 40 m alten leviĝas la du pilon-portaloj (bildo 1.) super la



veturvojo kaj portu la tir-forton de ambaŭ granddimensiaj portoĉenoj, je kiuj pendas la ŝarĝo de la veturvojo. Konstruitaj el plej bona aŭstria ŝtalo, nititaj kaj ŝraŭbitaj, ĉi tiuj du portaloj, kvankam aspektantaj en la tutbildo malgraŭ sia granddimensieco preskaŭ graciaj, devas tamen porti pezegan ŝarĝon. La du ĉenoj solaj pezas 2500 tunojn (t), do 250 fervojvagonŝarĝojn; unu sola ĉenero (bildo 2.) estas 1,20 m larĝa, 10 m longa kaj pezas 35 t. Al ĉi tiu pezo de la ĉeno ankoraŭ la pezo de la veturvojo estu alkalkulata kun pli ol 3400 t; komprenebla, se oni aŭdas, ke ĝi estas 24 m larĝa kaj havas 6 trafik-striojn por la trafiko de tramo kaj veturiloj kaj 2 irvojojn.

Entute oni uzis por la konstruado 9500 t da ŝtalo kaj 43.000 m³ da betono, por kiuj oni elspezis 12 milionojn da ŝilingoj (ŝ).

Multcentaj bravaj laboristoj kaj inĝenieroj, kutimitaj fari plene sian devon ofte en la plej danĝeraj situacioj (bildo 3.), ĝis nun laboris en 600.000 labor-sekcioj kaj ricevis kiel pagon 14 milionojn da ŝ.

Ĉi tiuj viroj de la laboro kunagadis, por majstri la amasegon je materialo kaj kunigi ĝin al la potenca la riveregon transpontanta majstroverko, ĉi tiu grand-agado en la aŭstria rekonstru-agado!

„Somera Universitato,
Internacia Konferenco de Instruistoj,
Internacia Konferenco de Virinoj,
dum la 28-a Univ. Kongreso en Wien 1936" jus aperis en 64 paĝoj, 23.5×15.5 cm, kun 18 paroladoj kaj 4 rezolucioj de s-anoj el 11 landoj. Prezo kun afranko aŭ ŝ 3.— aŭ 5 int. poŝt-resp. kup.

Burleskaĵo **„Antaŭaj cirkonstancoj"** de Nestroj, 42-paĝa, 1 resp. kup.

„Albumo de Wien", bele bindita kun pli ol 100 bildoj kun klariga E.-teksto, nur 5 resp. kup.

Ĉiuj menciitaj libroj haveblaj pere de nia gazeto.

Esperanto en la moderna vivo.

Internacia Konferenco.

Paris, 14.—17. majo 1937.

Protektoro la Ŝtatprezidanto Lebrun.

En Paris, en la koro de Francujo, la ŝopiro de via homo, okazos nunjare la Mondekspozicio kaj dum Pentekosto Internacia Konferenco „Esperanto en la moderna vivo".

Dum la 50 jaroj, dum kiuj Esp. nun ekzistas, Esp. eniris paŝon post paŝo la diversajn fakojn de la moderna vivo, kaj pluraj Internaciaj Konferencoj okazis pro enkonduko de Esp. en la lernejojn (Genève 1921, Wien 1934), en Komercon (Venezia 1923, Paris 1925), en la Reklamon (Frankfurt 1930), en la Praktikon (Wien 1934). Ĉi tiuj konferencoj estis vere utilaj. La Konferenco „Esp. en la Moderna Vivo" montros per siaj kvar Komisionoj, ke Esp. ne plu estas utopio, sed ke ĝi jam funkcias kiel praktika ilo por ĉiuspecaj internaciaj rilatoj, ke problemo de lingvo internacia ne plu ekzistas, ke ne plu estas eble konsideri konkurantojn de Esp., unuvorte, ke Esp. estas de nun la sola internacia vivanta lingvo apud la vivantaj lingvoj de la diversaj popoloj.

1. Esperanto en la lernejoj.

Prez. de la Prepara Komisiono rektoro Pariselle en Besancon, sekr. prof. Waringhien en Lille kun stabo da kunlaborantoj.

Granda laboro por la komisiono: ekzameni la jam atingitajn sukcesojn, dank' al la Konferencoj en Genève kaj Wien, havi la precizan situacion de la oficiala instruado en la diversaj landoj, ekzameni, ĉu la instruado estu deviga aŭ laŭvola ktp. Diplomoj, libroj, metodoj . . .

2. Internacia Trafiko.

Prez. ĝenerala direktoro de la ŝtataj francaj fervojoj s-ro Dautry, vicprez. ŝtatkonsilisto s-ro Mouton kaj H. Farman; sekr. ĉefing. de Norda Fervoja Kompanio M. Dupuis, poŝtoficestro P. Filiâtre. Unua tasko: zorge montri la praktikajn servojn, kiujn jam alportis E. en ĉi tiu fako de moderna vivo: informoj en la stacidomoj kaj havenoj, tabuloj pri la veturado sur la vojoj, informoj pri komercaj ŝipoj, oficialaj atestoj de Komercaj Ĉambroj pri origino de produktaĵoj, uzado de E. por varbado en komercao kaj industrio, internaciaj rilatoj de la metiistoj, uzado en Foiroj, por la turismo (hoteloj, propagandiloj, turismaj radio-dissendoj, policanoj, fervojistoj, poŝtistoj ktp.).

Kiel duan taskon la komitato preparas la vojon al pli granda uzado de E. en la internaciaj interŝangoj: en mar- kaj flug-havenoj, surŝipe kaj aviadile, en translimaj trajnoj, ĉefstacidomoj, landlimaj stacidomoj, doganoj, radio-polico, poŝtoficejoj, turismaj oficejoj, hoteloj, bankoj, borsoj.

3. Sciencoj kaj Teknikoj.

Prez. s-ro Cotton, membro de la Franca Akademio de Sciencoj; vicprez. emerita generalingeniero de la franca maristaro Rollet de l'Isle, s-ro Rousseau; sekr. ing. Naoumoff ktp.

La komisiono faros la inventarion de la atingitaj rezultoj en sciencoj kaj teknikoj kaj deziras fini la teknikajn vortarojn en E. kaj krome ĝi celas sistemigi la uzadon de E. por la sciencaj internaciaj rilatoj, la starigon de internacia scienca Centro Esp-ista por la traduko de ĉiuj gravaj sciencaj verkoj en E-on. Ĉi tiu komisiono, laborante kun la 4-a preparos veran internacian intelektan kooperadon.

4. Intelektaj interŝangoj.

Prez. s-ro Bonnet, direktoro de Internacia Instituto pri Intelekta Kooperado de Ligo de Nacioj; vicprez.: H. Favrel (radio), Cudenet (gazetaro).

Ĝi faros la inventarion de la tradukoj de la ĉefverkoj, de la internacia literaturo en E., kaj same por la diversaj esprimoj de la penso, la inventarion de la originala literaturo en E.

Ĝi celas montri, ke internacia arto, en teatro, kino kaj radio jam ekzistas. Ĝi havas la ĉefan taskon elvoki la kulturan valoron de E. en ĉiuj fakoj de la penso.

La plezuroj de la Konferenco.

Paris, la unika urbo.

Mondekspozicio, en kiu gvidos multaj e-istoj. **En preparo** gvidlibro de Paris, amuza gvidlibro pri la vizito de la ekspozicio, gvidlibro pri la vizito de Paris per aŭtoĉaroj.

Montmartre, Montparnasse, Quartier Latin, la eternaj kvartaloj. Gvidlibroj pri la vivo en ĉi tiuj kvartaloj en preparo.



En la montoj ĉe Gastein.

Klišo: Ö. V. W.

La solenaj kaj laboraj kunsidoj okazos en la plej bela Palaco de la Ekspozicio. Imponas estos la solenaj malferma kaj ferma kunsidoj kun arta programo.

La **oficiala festeno** en plej bela Pariza kadro.

Humoro de Montmartre. Estos prezentata belega teatra vespero kun bonaj artistoj kaj kun E.-jubilea revuo laŭ la maniero de la kabaredoj de Montmartre, verkata de nia fama Rajmond Schwartz, la iama direktoro de „Verda Kato" en Paris.

La **memoran insignon** desegnos la fama skulptisto nia s-ano Ludoviko Rodo Pissaro.

Paris kaj tuta Francujo kore invitas vin!

Malalta kotizo: 100 fr. fr. (aŭ ŝ 25.—); por pagantoj ĝis 15. febr. 20% rabato; samfamilianoj 75 fr. fr.

Kaj **vi ricevos:** 1. Konferencinsignon, 2. abonon dum 6 monatoj de la oficiala gazeto de la Konferenco, 3. ĉiujn dokumentojn de Konferenco, 4. rabaton de 40% sur la francaj fervojoj, 5. senpagan enirrajton en la Ekspozicio dum 6 tagoj, 6. senpagan partoprenon al ĉiuj solenaĵoj kaj al la teatra vespero, 7. senpagan karton por la granda oficiala festeno. Plenaj informoj en la venonta numero.

Aŭstrianoj povas pagi al kortega konsilisto Steiner, Wien, I., Neue Burg la, kotizon por Parizo, aldonante 1 ŝ por la forsendo de la mono.

Oesterr. Verkehrsbureau, Wien, I., Friedrichstraße, aranĝos karavanon al Paris, al kiu povas aliĝi ankaŭ eksterlandanoj. Anoncu vin al s-ro Steiner.

Laŭ peto de la Komitato mi transprenis por Aŭstrio la taskon interesigi la diversajn instancoin al partopreno. Helpu al mi, sendante tuj el Aŭstrio adresojn de tiaj instancoj por kiuj ni sendu invitleterojn, kiujn vi poste povos mem transdoni. Steiner.

Esperanto en Germanujo.

Laŭ postulo de la polico antaŭ kelka tempo la E.-organizoj en Germanujo devis ĉesi labori. Tiu decido sendube rezultis el la kontraŭbatalado de du en Germanujo ekzistantaj E.-organizoj kaj eĉ en la de nunco, ke unu el ili akceptis membrojn, kiuj agis en kontraŭnacia senco. Sed la uzado de E., la portado de la verda stelo, aranĝo de kursoj ktp. estas permesataj.

Komerca E.-Unio ankaŭ estis devigata likvidi, sed samtempe protestis. La polico tute komprenis la gravecon de la laboro de KEU kaj per dekreto de 7. 9. 1936 (Akto S-PP IIA 1132/36) permesis

la daŭrigon de la laboro.

Ĉiuj nun subtenu KEU, Dresden-Radebeul, Friedrich-August-Str. 4, Germanujo, per ĉiuj fortoj, ĉar ĝi nun devas montri per faktoj, ke la decido de la polico estis prava.

Innsbruck, la vintro-sporturbo.

Originala artikolo de Landesfremdenamt, Innsbruck.

La belega situo de Innsbruck, ne nur allogas la fremdulojn dum la somero, sed ankaŭ dum la vintro. Ĉiuj vintrosportlokoj de Tirol facile estas atingeblaj el Innsbruck: la belega regiono sur Arlberg aŭ la famaj Alpoj ĉe Kitzbühel, la ski-paradizoj de Oetztaler Alpoj kaj de Zillertal.

Sed ankaŭ tute proksime al la ĉefurbo mem la skiisto havas la ĉarmajn regionojn kaj deklivojn de Seefelder Senke, Achenvalo, montaro ĉe Stubai kaj Sellrain kaj en la regiono ĉe Brenner.

Antaŭ la urbo Innsbruck mem Patscherkofel- kaj Nordĉen-kablofervojoj transportas la skiiston meze en belegan altalpan skiterenon. Informojn ĉe Landesfremdenamt.



Rigardo al Innsbruck kun Nordĉeno.

Foto: Tiroler Kunstverlag.

Ni parolas pri novaj aŭstriaj filmoj.

El la Radio-parolado de ĉefredaktoro Nikolaus Hovorka — Wien, la 22. de januaro 1937.

Ĉu la filmo estas arto same kiel ekz. la muziko, la pentroarto, la liriko, la teatro? Tiuokaze la filmo estas la plej moderna maniero de prezentado; ĝi respeguligas ĉiujn tipajn bonajn kaj malbonajn flankojn de la homo de nia tempo: jen simptomoj de senesperiga mizero kaj banaleco, jen signoj kaj eroj de gracoplena produktiva genieco.

La filmo reprezentas imponan potencon, influantan ĉiujn sferojn de la moderna vivo: la filmo influas la ekonomion, la kulturon, la politikon, la erotikon, la moralon, la formojn de la ĉiutaga vivo.

Ĝis antaŭ nelonge la aŭstria filmo multe suferis, ke la intelektuloj kaj kleruloj rigardis la filmteatron kiel ejon por la plej supraĵa, senvalora kaj primitiva amuzo. Al la aŭstria filmo nun prezentis la tasko, elmontri la grandiozajn riĉecojn de aŭstriaj naturbeleco kaj kulturtrezoroj kune kun la nature donitaj arta genieco kaj gracieco de la aŭstria popolo.

Sed ne kredu, ke tiu primitiva tielnomata „Viena filmo", montranta ĉiam la samajn vindrinkejojn, la samajn dolĉaĉe kantantajn ebriulojn, ĉiam plena de tiu mensoga kaj falsa romantikeco kaj sentimentaleco — ne kredu, ke tiu aĉa mensogema filmo, de kiu ni ĉiuj jam estas trosatigitaj, ne kredu, ke tiu filmo, fabrikita en la lastaj jaroj preskaŭ nenescepte de spekulaciistoj ekster la limoj de nia lando, montranta de ĝi eĉ ne unu veran trajton — ne kredu, ke ĉi tiu speco de filmo estas la **„Aŭstria filmo"!**

Se vi volas havigi al vi imagon de vera aŭstria filmarto, pensu pri **„Maskerade"** (maskofesto), en kiu ni flaras la dekadencepolĉan atmosferon de la antaŭmilita Vieno de Makart-epoko *). Aŭ pensu pri **„Epizodo"**, kiu donas pentraĵon de Vieno, kia estis tuj post la milito, kiam la inflacio kaj spekulacio allogis ĉiuspecajn aventurulojn en nian urbon, en kiu tamen vivis, suferis kaj amis homecaj homoj. La reĝisoro de „Maskerade" estas **Willi Forst**, de „Epizodo" **Walter Reisch.** Ambaŭ filmoj ĵus-is grandaj mondsukcesoj kaj montris la plejkvalitajn kapablojn de Aŭstria filmproduktado. Sed la plej grandan meriton por la sukceso havis la nekomparebla, en plej profunda senco la filmeca talento kaj genio de Paula **Wessely.** Kion ŝi en ambaŭ filmoj kreis por la aŭstria filmarto, estos iam brava ĉapitro en la historio de ĉi tiu arto. Baldaŭ post „Maskerade" kaj „Epizodo" sekvis **„Hohe Schule"**, en kiu la ĉiam pli perfekta aktora arto de la aŭstriano **Rudolf Forster** sind dediĉis al la temo kaj problemoj de la oficira honoro. Ankaŭ granda sukceso.

Ein ĉi tiuj tri filmoj la aŭstria filmarto atingis en sia nova epoko sian unuan plej altan, kulminacian punkton. La elementoj, al kiuj nia filmarto dankis sian grandan sukceson, ordiĝas en du grupoj: unue ĝi kulfrapas la matura teknika perfecteco kaj due la enpenetro kaj enprofundiĝo en spiritajn, animajn kaj moralajn problemojn. Tiu nova aŭstria filmo prefere serĉis siajn temojn el la antaŭmilita kaj plihistoria epokoj, super kiuj ŝvebas la delikata atmosfero de romantiko kaj tradicio. Krom tiuj temoj de socie-kultura karaktero aliaj utiligas al si la rimedojn kaj eblojn de la aŭstriaj pejzaĝo, humoro kaj muziko. Unu el la plej bonaj estis **„Vorstadtvarieté"**, kiu animkapte prezentis la iom banalan temon de antaŭurba varieteo, eluzante ĉiujn filmecajn eblojn. Ni menciu ankoraŭ la ĉarman rokoko-filmon **„Pompadour"**, la historian filmon **„Nur komedianto"**, kiu nin enpenetrigas en la atmosferon de la teatro kaj kortego de la 18-a jarcento, en kiu **Rudolf Forster** ludis du rolojn.

El la lastaj filmoj ni menciu **„Ernte"** (Rikolto) aŭ „Julika", **„Burgtheater"** kaj **„Lumpacivagabundus"**. **„Rikolto"**, kies reĝisoro estis **Geza von Bolvary**, montras al ni la sorton de juna servistino kampara, kiu silente kaj virinece servadas ĝis kiam la viro, kiu vane en la malproksimo serĉas sian feliĉon, ekkonas, ke ĉi tiu feliĉo proksime apud li lin atendas. Ke ĉi tiu filmo nin kaptas, estas unuavice kaj preskaŭ sole ree la merito de la granda arta kapablo de **Paula Wessely.** Certe ne de la filmlibro, al kiu iom mankas la psifiologia enpenetro en la konfliktojn kaj problemojn. Bonega ankaŭ **Attila Hörbiger,** kiu prezentas la oficiron, kiu helpe de la servistino sukcesas sanigi la preskaŭ bankrotan hereditan bienon. Sed vere grandioza estas **Paula Wessely** en sia varma, sana kaj ĝoja virineco, en rolo plena da simpleco kaj saĝeco. Ĉi tiu servistino, kiu kreskas de la nekonscie al la konscie amanta virino, ŝia humileco en la servado kaj fiero en sia amo — — — Paula Wessely estas la granda travivaĵo de ĉi tiu filmo.

Tre interesa la filmo **„Burgtheater"**, en kiu vibras kaj vivas la atmosfero de tiu plej fama germanlingva teatro. Reĝisoro **Willi Forst** sin montras vera majstro en la konstruo kaj sinsekvo de la scenoj. Kortuŝa kaj animfrapa estas **Werner Kraus,** kiu ludas la rolon de maljuniĝanta eminenta aktoro, de aktoro, kiu vivante ĉiam nur por la scenejo, forgesis kaj mallernis la vivon, kiu nur plu disponas pri la vortoj de la scenejo, disŝirita de amo, fiereco kaj kompato, amante junan knabinon, kies koro jam apartenas al alia, al juna nekonata aktoro, kiu iam sekvos sian eminentan kolegon same sur la scenejo kiel nun en la koro de tiu ĉarma junulino.

Kiel lastan ni menciu **„Lumpacivagabundus"**, kiu uzas kelkajn motivojn el la samnoma ŝerca popolteatraĵo de la eminenta aŭstria aŭtoro Johann Nestroy. **Geza von Bolvary** estis la reĝisoro. **Paul Hörbiger, Heinz Rühmann, Hans Holz, Hilde Kral, Richard Eybner** estas la ĉefaj aktoroj. „Lumpacivagabundus" estas la spirito de facilanimeco, ebrieco kaj diboĉo. Tri vagantajn metiistojn li volas kapti, sed du trovas bonajn edzinojn kaj trankvilan honestan hejmon, kaj nur unu lasas sin kapti kaj daŭrigas kun „Lumpacivagabundus" la gajan vivon. La aŭstria pejzaĝo kun siaj plej delikataj ĉarmoj kunludas efike en ĉi tiu vere plaĉa kaj amuza filmo.

*) Hans Makart (1840—1884), fama aŭstria pentristo.

Al la nacia repacigo de Eŭropo.

Nesolvitaj naciaj demandoj, malkonkordo inter popolaj plimulto kaj malplimulto kondukis en pasinteco kaj nuntempo al internaj kaj internaciaj konfliktoj, internaciaj diferencoj — militoj. En la nuna tempo, kiam la demandoj de la malplimultoj denove estas danĝere aktualaj kaj rezultiĝas gravaj danĝeroj por la estonteco de Mezeŭropo kaj de la okcidento, estas necese fari la provon de konstrua solvo de la nacia problemo kaj per tio gajni direktivojn por la repacigo de Eŭropo kaj por la sekurigo de okcidenta kulturo.

Purnacia ideologio sur la historia tero eŭropa ne estas ebla. La loĝcirkonstancoj de la popoloj malebligas konformecon de la etnografiaj kaj landaj limoj. El la kunvivado ĵus de la germanaj popolgrupoj kun siaj gastigantaj popoloj elvenis valora pensaro kiel aldono al la rekonstrua solvo de kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj demandoj en Eŭropo.

Por doni al ĉi tio la decan formon kaj la necesan resonon, estu je konsidero de Danubo-regiono tasko de Germana Ligo al nacia repacigo de Eŭropo.

Se nuntempe ŝtato, popoleco kaj mondpercepto luktas pro la potenco en la koncerna teritorio, nek la venko de unu el ili nek ilia kunigo al tuteco povas alporti veran pacon, sed nur samrajtan laboron flanko ĉe flanko en la servo por la okcidento solidareco kaj ilia kulturo.

La naciaj malplimultoj ekkonis el sia sorto la fatalajn sekvojn de kunigo de teritoria regado kaj popoleco kaj laboras por novordigo. Sed la solvo de la nacia demando ne plu povas esti la tasko de la malplimultoj, temas pri afero de ĉiuj popoloj en Eŭropo. Sed ĉiu popolo devos prepari en la kadro de sia kultursfero la grundon por ĉi tiu solvo.

La germana popolo speciale estas destinita por tia laboro, tial ni alvokas niajn samnacianojn sen diferenco de religio,



Vintrosporto:
Veturado per „Bob"-glitveturilo.
Klišo: Ö. V. W.

Stataneco aŭ deveno, kunlabori en la verko de nacia repacigo kaj aliĝi al
Germana Ligo por repacigo de Eŭropo.
D-ro Paul Schiemann, Riga-Wien,
Prof. d-ro Eduard Pant, Kattowitz,
Senatoro Carl Kostka, Reichenberg.
Informojn kaj aliĝojn ĉe: Waldemar Quaiser, Wien, 18., Julienstraße 40, oberes Haus.

Federacia Kancelierejo proponis al ni, por helpi al nia Varbad-Servo, **dissendi al ĉiuj niaj 190 ambasadorejoj kaj konsulejoj aŭstriaj** po kelkaj numeroj de AE. Ni kun danko disponis la koncernajn numerojn. El tio oni povas ekkoni, **kiom efikis la unua numero de la Varbadservado!**

Aŭstria Esperantisto nun eliras al 122 landoj en ĉiuj kontinentoj:

Eŭropo: Albanio, Belgujo Britlando, Bulgarujo, Cipro, ČSR., Danujo, Danzig, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Gibraltar, Grekujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlando, Islando, Italujo, Jugoslavio, Latvujo, Liechtenstein, Litovujo, Luksemburgo, Malta, Monako, Nederlando, Norvegujo, Portugalujo, Rhodos, San Marino, Svedujo, Svisujo, Turkujo, USSR, Vatikanurbo. Afriko: Algerio, Angola, Azoroj, Cirenaiko, Ebura Marbordo, Egiptujo, Etiopio, Gabun, Fr. kaj Hisp. Guinea, Kanarioj, Kenya, Belg. kaj franc. Kongo, Madagaskaro, fr. kaj hisp. Maroko, Nigerio, Port. Orient-Afriko, Sa. Thome, Sudafriko, Sud Rhodesio, Br. kaj fr. Sudano, Taganyika, Br. kaj fr. Togo, Tunisio. Ameriko: Alaska, Argentinio, Bolivio, Brazilio, Ĉilio, Kostariko, Grenado, Br. kaj fr. Guyana, Haiti, Honduraso, Jamaiko, Kanado, Kanal Ins., Br. Kolumbio, Kolumbio, Kuba, Martinique, Meksiko, Nov Fundlando, Panama, Paraguajo, Peruo, Surinamo, Trinidado, Uruguajo, Venecuelo. Azio: Borneo, Br. Hindujo, Celebes, Ceylon, Ĉinio, Fr. Indoĉinio, Honkong, Irako, Johore, Koreo, Mangurio, Mongolio, Ned. Hindujo, Palestino, Persio, Filipinnaj Ins., Selangor, Trovankore, Uzbekestan, Aŭstralio: Aŭstralio, Havajo, Nov Kaledonio, Nov Zelando, Nov Sud Wales, Queenslando, Tahiti, Sandwich Ins., Viktorio.

Ministerio por la Gazetaroj kaj Propagando.

„Ministero per la Stampa e la Propaganda“, Cronache Italiane del Turismo, Via Vitt. Veneto 56, **Roma** nun preparas luksan broŝuron **„La kvar sezonoj“.**

Mendu per simpla karto en E. tuj la bezonotan kvanton de la broŝuroj sempage.

Internacia Esp.-Muzeo

Wien, I., Neue Burg.

Novaj membroj dumvivaj: S-ro **Peter Heinrich** Wien.

Kotizo por dumviva membreco: sv. fr. 16.— aŭ egalvaloro (ankaŭ pagebla en intern. poŝtresp. kup. kaj en 3 partpartoj). Dumvivaj membroj ricevos membrokarton 64-paĝan gvidlibron de Wien kaj 80-paĝan libron „Tra Aŭstrio per aŭtobuso“ kun 70 bildoj, diversajn gvidilojn, 5 fotojn de la Muzeo kaj ricevas 10% rabaton ĉe aĉeto de jenaj libroj: „Albumo de Wien“ (ordinara prezo 5 resp. kup.), „Somera Universitato, Internacia Instruista Konferenco, Internacia Konferenco en Wien 1936“ (ord. prezo 5 r. k.) kaj „Moderna aŭstria Antologio el la 20-a jarcento“ (en 6 partoj po 64 paĝoj po 4 resp. kup.), „Antaŭaj cirkonstancoj“, burleskaĵo, 42-pĝ., 1 r. k., ĉiuj kun afranko.

En preparo: Artikolo pri **„Kutimoj en Aŭstrio“**, kiu vin vorte kaj bilde enkondukos iomete en la riĉegan trezoron de la kulturaĵoj, hereditaj kaj konservataj de la aŭstria popolo. La vivoĝojo kaj vivĵesado de la aŭstriano esprimiĝas en ĉi tiuj verkoj de hejmlanda popolarto, kiu konigas al ni pra-an kulturhistorion de altcivilizita popolo.

Krome interesaj artikoloj: **„Aŭstriaj pentristoj“, „Bruckner-festarangoj en Supra Aŭstrio“, „Festludoj en Salzburg“, „Aŭstriaj Altŝoseoj“, „Aŭstriaj Kablofervojoj“, „Skoltomovado“.**

Al Andreo Cseh kore kaj amike.

ANDREO CSEH, amiko, frato,
jam pasis jaroj dudekkvin,
depost kiam la sort' aŭ fato
al ĉar' kultura jungis nin.

En nia koro ardas flamo;
vi PASTRO estas, bardo — mi.
Predikas vi pri l' „dia amo“,
mi kantas pri la „amo-di“.

Sed en laboro por ideo
ni migris ja sur sama voj';
dó decas nun dum jubileo
saluti vin kun kora ĝoj'.

Akceptu manon por manpremo;
fratamo estas muta sent',
En koro regas la soleno
sen flata vort', sen kompliment'.

En mia koro vive ardas
parenca am' kun harmoni'.
Ĝi amikecon firme gardas,
kaj ĉiam fratoj restos ni.

La sortfavor' kaj dia beno
kirasu vin dum la labor',
ne trafu sago de l' veneno
la kreoforton de la kor'!

Reprenu vian labortaskon,
ekipu vin per bona san'
por servi pli, plenumi taskon
kaj resti plu — samidean'!

Julio Baghy.

Kongreso de „Harand-movado“.

Ĉi tiu kongreso okazos en la dua parto de aŭgusto nunjare kaj allasos Esperanton kiel kongreslingvon. Ĝi havas sian propran organon „La Justeco“, en kiu ĝi aperigas E.-kurson de d-ro Pfeffer por prepari la kongresanojn al reciproka interkompreno.

La tezo de la Movado estas „kontraŭ rasa malamo kaj homa mizero“ sub la devizo „ĉiu homo sur la tero havas la rajton vivi“.

La kongresoficejo, Wien, I., Elisabethstr. 20, Aŭstrio, eldonis nun en Esperanto informilon pri la kongreso, pri la celo kaj agado de „Harand-Movado“, kiun persone gvidas s-ino Irene Harand kun malofta energio kaj sindediĉo, kaj pri la programo. Mendu senpage. Aliĝo por ĉiu ebla, kotizo libervola!

Gazetistoj, samideanoj!

Represigu artikolojn, notetojn el nia gazeto kaj sendu al ni la koncernajn gazetojn. Vi ricevos por ĉiu alsendita gazeto belajn gvidilojn rekompence. Je la fino de 1937 ni disdonos premiojn por la 10 samideanoj, kiuj sendis al ni la plej multajn represitajn artikolojn.

Imitu la agadon de „Gazetara Komitato de Norvega Esperantista Ligo en Stabekk“, kiu en diversaj gazetoj en diversaj lokoj de Norvegu publikigis 87 artikolojn pri Aŭstrio en 1936.

Koran gratulon kaj dankon.

Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio.

Viena Foiro. (7.—14. marto.)

Ankaŭ por la Printemp-Foiro Viena Foiro eldonis belan gvidilon. Ni aldonas ĝin por niaj abonantoj.

Wien.

Raporto de Fremdenverkehrsstelle.

Venontaj aranĝoj:

Ĝis fino de marto okazos en la diversaj koncertejoj Konzerthaus, Musikvereinshaus, Ehrbarsaal ktp. diversaj koncertoj je violono, piano, kanto ktp. de famaj artistoj kaj grandaj Orkestro-koncertoj (Wiener Männergesangverein, Philharmoniker, Gesellschaft der Musikfreunde kun Radio Wien) sub la direktado de Felix von Weingartner, Hans Knappertsbusch, Oswald Kabasta. 17. II. **„70-jara Danubo-valso“** sub la direktado de Johann Strauß (nepo), F. v. Weingartner, prof. Großmann, d-ro G. Gruber. Kantos: Hilde Konetzny, Desi Halban-Kurz, Rich. Sallaba. Kunaktoros: Vien-a vir-kant-unuiĝo, Filharmoniistoj, Vienaj Simfoniistoj.

Ŝtata operejo:

Februaro: „La Kompenso“ de Wenzel Traunfels (unua prezentado), „La Foiro de Sorotschintzi“ de Moussorgsky (nov-enstudado).

Marto: „Ornamo de Madono“ de Wolf-Ferari; muzika direktado: Hans Knappertsbusch (unua prez.). „Schwanda la sakfajfilisto“ de Jaromir Weinberger (nov-enstud.).

Burgtheater:

En preparo: „La konspiro de Fiesco en Genova“ (novenscenado; n. e.); „La vivanta kadavro“ de Tolstoi (n. e.); „La muta kavaliro“ de Eugen Heltai (germ. unua prez. g. u. p.); „Imperiestro Josef II.“ de Rud. Hen (g. u. p.); „La sankta Elisabeth“ de Jos. Wen (u. p.); „3. novembro 1918“ de Theodor Czokor (u. p.); „Rajdistkanto“ de Jos. Fel (u. p.); „Mario Falieri“ de Wolfgang Burghauser (u. p.).

„Aŭstria Antologio de la 20-a jarcento“ aperos dum 1937 en 6 partoj po 64 paĝoj kaj traktos nur pri modernaj aŭstriaj verkistoj, ĉu jam famaj ĉu altesperigaj.

Prezo po libro, ĉiu formonta aparta tutaĵon, aŭ ŝ 2.10 plus 30 g afranko. Antaŭmendintoj kaj pagintoj por ĉiuj 6 ricevos senpage belan kovrilon por la tuta verko.

Pagintoj ĝis 28. februaro por 1 aŭ ĉiuj ses libroj, ŝparos pagi la afrankon!

Kompilanto: Steiner, Wien, I., Neue Burg.

Organizo de Esperanto.

Mondorganizo: **Internacia Esp.-Ligo**, al kiu aliĝis preskaŭ ĉiuj landaj organizoj en la tuta mondo. (IEL) Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

Landa organizo por Aŭstrio: **Aŭstria E.-Asocio**, Wien, I., Neue Burg.

Oficiala organo: **Aŭstria Esperantisto.**

Cefdelegito de IEL: **Gustav Weber**, Wien, I., Neue Burg.

Anoncoj havas plej bonan efikon, ĉar la gazeto eliras al 122 Landoj; 2-lina ŝ 2.—, ĉiu plua linio ŝ 1.—.

Mi deziras **interŝanĝi** pm. kun USSR, Italujo, Hispanujo, Portugalujo kaj Ekstereŭropo. Kont. kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg, eldon. de la gazetto.

Demando!

Ĉu vi aŭ konato de vi en eksterlando deziras ricevi nian gazeton regule? Tiam sendu 9 respondkuponojn por la tuta jaro 1937 aŭ kvanton da bonaj uzitaj poŝtmarkoj el viaj lando, prefere aer-, bonfarem-, jubileo-poŝtmarkoj. Afranku filatelie. Laŭ la valoro de sendos eventuale por tuta 1937 la gazeto.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur **Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg,** Bundesstraße 154. **Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 28.**

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist"

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des **Oesterreichischen Esperanto-Bundes**

Nr. 2 (17) Februar 1937

Für Oesterreich jährlich mit Postzusendung, nur zu fünf Stück, S 2.50 in Briefmarken. — Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-12.826

Scherer-Vorträge in Österreich.

Joseph R. Scherer kommt Samstag, den 13. Februar, früh, nach Wien, wird bei der Ravag eine Schallplatte besprechen, die dann später gesendet werden wird.

In Wien Filmvorträge: 13. Februar und 14. Februar im Festsaale der Gastwirtegewerkschaft, IV., Treitlgasse 3, um **14.30 Uhr** und **16.30 Uhr** die Vorträge: „100.000 km im eigenen Wohnauto ohne Zoll-, Paß- und Valutaschwierigkeiten" oder „Das wundervolle Hollywood". Eintritt sehr gering. Vortrag in deutscher Sprache, Bekannte einladen.

Am 13. Februar im **Restaurant Tischler,** I., Schauflerg. 6, Gruppenabend **Esperanto-Klub:** Scherer spricht in Esperanto. Beginn genau 20 Uhr. Gäste willkommen.

Am **15. Februar** Vortrag in **Klagenfurt** in der „Volkshochschule für Jedermann" und am **16. Februar** in der Urania in **Salzburg.**

Wir wünschen Herrn Scherer guten Aufenthalt in Oesterreich.

Esperanto in Deutschland.

Ueber Forderung der Polizei mußten vor einiger Zeit die Esperanto-Organisationen in Deutschland sich auflösen. Es blieb aber gestattet, das Esperanto-Abzeichen zu tragen und Esperanto in Wort und Schrift zu gebrauchen.

Es wurde auch ein Esperanto-Unternehmen, das vermittels Esperanto Geschäfte für Deutschland nach dem Ausland tätigte, aufgelöst. Nach Protest wurde die letztere Auflösung rückgängig gemacht.

Reclam Universum (Ausgabe C)
vom 21. Januar 1937. S. 282.

Ein Kapitel „Sprache".

Der Streit um den Gebrauch einer Landessprache bei internationalen Verhandlungen, eine reine Prestigefrage, ist fast so alt wie internationale Verhandlungen selbst.

Versuche, eine allgemein verständliche, für alle maßgeblichen Völker leicht erlernbare Weltsprache zu finden, sind über Volapük, Esperanto, Ido, Ilo, Interlingo und wie sie alle heißen, immer wieder gescheitert. Mag sein, daß die eine oder andere „Weltsprache" noch immer — unter dem Ausschluß der Oeffentlichkeit — ihr Dasein fristet, praktisch indessen sind sie alle tot.

Doch vielleicht wäre eine nötig, manch unerwünschter Streit, manch peinliche Situation würde vermieden.

Als — zur Zeit der Königin Elisabeth — der englisch-spanische Krieg beendet werden sollte, wurden von beiden Seiten Vertreter zur Festsetzung der Friedensbedingungen ernannt. Da keiner von beiden in der Sprache des Gegners verhandeln wollte, schlug der Spanier — unter Hinweis darauf, daß ihre Majestät von England sich ja auch Königin von Frankreich nenne — die französische Sprache vor.

Hievon wollte aber der Engländer nichts wissen, er ärgerte sich über die Begründung des Vorschlages für Französisch, erklärte diese Sprache für völlig ungeeignet und schlug nun seinerseits vor, Hebräisch zu wählen, indem er begründete, der König von Spanien bezeichne sich ja auch als „König von Jerusalem".

Es ist sehr bedauerlich, daß Reclam nicht besser über Esperanto informiert ist.

Radiojournal Brünn,

genannt „Die grüne Station" (Esperantostation), brachte am 4. Februar mit ihren Sendern Brünn, Prag I und M.-Ostrau ein Radiospiel, „La decido" (Die Entscheidung), in Esperanto verfaßt von dem Engländer Douglas P. Boatman. Es spielte das Ensemble der Brünner Station unter der Regie von Dalibor Chalupa.

Laut Statistik der Station Brünn sandte dieselbe im Jahre 1936: 6 Schauspiele, 2 Kabarette, die Operette Nedbals „Polnisch Blut", 1 Reportage, Lieder u. a. An die Station kamen aus 28 Ländern 1727 Esperanto-Zuschriften.

Am **9., 16. und 23. Februar** von 18 bis 18.10 Uhr von M.-Ostrau Esperantovorträge.

Prüfungen für das Lehramt und den Nachweis der Kenntnis des Esperanto beginnen Dienstag, den 6. April, um 8 Uhr früh, in der Bundeslehrerinnenbildungsanstalt in Wien, I., Hegelgasse 14. Die Gesuche um Zulassung sind bis längstens 20. März 1937 bei der Direktion der Prüfungskommission, Wien, I., Doktor-Ignaz-Seipel-Ring 1 (Stadtschulrat) einzubringen.

Portugal. Das portugiesische Schulministerium schuf eine besondere Prüfungskommission für Esperanto. Das Marineministerium bewilligte das Tragen eines besonderen Abzeichens für die Kandidaten, die die Prüfung aus Esperanto abgelegt haben. Das Schulministerium hat auch angeordnet, daß in verschiedenen Schulen u. a. auch in der Polizeischule in Lissabon Esperanto in den Lehrplan aufgenommen werde.

Tschechoslowakei: Der Prager Komponist Emil W. Müller hat die erste Kantate in Esperanto „Preĝgo sub la verda standardo" (Gebet unter der grünen Fahne) für Soli, Chöre und großes Orchester nach dem Gedichte von Dr. L. L. Zamenhof beendet. Das Werk wird auf dem 29. Internationalen Esperanto-Kongreß 1937 in Warschau uraufgeführt werden.

Filmoj de Heimatdienst.

„Heimatdienst" kunigis es sia riĉa materialo vicon da interesaj kaj vidindaj serioj da lumbildoj el la kulturo, arto, historio ktp. de Aŭstrio. Ĉi tiuj serioj estas kolektitaj pro aparemo kaj praktika uzebleco en filmeroj kaj kostas kun kompleta, instrua paroltekstо S 4.40. Mendu senpage la prospekton ĉe: Heimatdienst, referento inĝ. E. H. Jordan, Wien, I., Hofburg, Michaelertrakt.

Kursgvidantoj mendu senpage provnumerojn por ekzercado. Indiku la nombron.

Vizitu la grupvesperon, imitu:

„Ĉu pluvas, neĝas aŭ tempestas,
Ĉu brikoj falas al la ter' — —
Ja kiel ajn ekstere estas,
Mi iras al la grupvesper'!"

Hans Zeller, Steyr.

Aŭstria Landa Kongreso en Krems.

30. aprilo ĝis 2. majo 1937.

30. April: Begrüßungsabend.

1. Mai: 9 Uhr: Gottesdienst mit Esp.-Predigt (P. Mestan) in der Piaristenkirche. — 10 Uhr: Festversammlung: Begrüßung durch die Behörden usw. „Ueber die Bewegung", Hofrat Steiner. — Nachm.: Arbeitssitzung. Rundgang durch die Stadt. — Abends: Festabend mit Musik, Gesang, humoristischen Vorträgen, Volkstänzen; Abschluß: Tanz.

2. Mai: Vorm.: Gottesdienst, Führungen; Besuch des Wachauer Frühlingsfestes. — Nachm.: Ausflug nach Stift Göttweig. Gemeinsame Fahrt von Wien per Bahn, Rückfahrt nach Wien mit Schiff.

Anschrift: Regierungsrat Gottfried Kern, Krems a. d. D., Schillerstr. 30 (stets Anfragen Rückporto beischließen!).

Kongreßbeitrag: Bis 10. April S 2.—, für Arbeitslose und Familienmitglieder S 1.—; Kinder bis 14 Jahren frei. Nach dem 10. April: S 3.—, bzw. S 1.50.

Zimmerpreise: 1-Bett-Zimmer S 3.50 bis 5.—, 2-Bett-Zimmer S 5.80 bis 9.50 für eine Nacht, einschließlich Trinkgeld. Anmeldungen hiefür möglichst bald senden, da während der Wachauer Festspiele Zimmer sehr gesucht sind. Nur für solche, die Zimmer unter gleichzeitiger Einsendung des Geldbetrages, bis 20. April einsenden, kann Zimmer sichergestellt werden.

Einzahlungen mit grauem Posterlagschein auf Konto-Nr. A 187.625 Gottfried Kern, Krems a. d. D., unter deutlicher Angabe des Namens, Berufs und für wieviele Personen.

Kongreßkarte erhalten Sie sofort nach Zahlung zugesandt.

Leitung des Oesterr. E.-Bundes.

Preciza tagordo en la venonta numero. La ĉefa punkto estos novelekto de la prezidanto. Kiel konate mi nur transprenis kontraŭvole kaj nur por unu jaro la prezidantecon de AEA. Mi jam nun anoncas, ke mi sub neniuj kondiĉoj transprenos denove iun oficon en la organizo, kies „Honorprezidanto" mi restos. Jam nun mi proponas en interkonsento kun la estraro kiel prezidanton nian estraranon reg. kons. Fritz Stengel.

Steiner, prez.

La AEA-anoj, kiuj ne estas en iu grupo, afable sendu sian kotizon por 1937 S 2.—, senlaboruloj S 1.— plus 10 g poŝtelspezoj, ĉar alie ni ne povas sendi nian organon „2. Sprache für alle". Subtenu nin kaj certigu al vi vian membrecon al AEA/IEL.

Ne atentu diversajn „onidirojn". La organizoj estas por ĉiu IEL—AEA.

La estraro.

El la aŭstria movado.

Bizau, Vorarlberg. Nia s-anino instr. Erna Fabjan gvidas kurson.

Ebensee. Kurso komenciĝis, instruas s-ano Weißkirchner laŭ instrulibro „Freude durch Esperanto". Heißl.

En kinoteatro ruliĝas reklamo „Lernu Esperanton", kun permeso de la urbestro senpage.

E.-Soc. por Stirio, Graz havis la 12. dec. sian ĝeneralkunvenon. La estraro: prez. kolonelo Hackl, vicprez. kaj grupestro W. Rogler, sekr. kaj bibliot. d-ro W. Biehler, anstat. Felix Bauer, kasisto K. Bartel, anstat. J. Turk, kontrol. R. Calisto kaj inĝ. Schalko. Kunsidantoj: C. Lossos, J. Laschat (Graz), L. Pernegg (Eggenberg), lernejkons. S. Schöpfer (Voitsberg).

Krems. Ĝeneralkunveno 19. I.: Elektoj: prez. reg. kons. Gottfried Kern; vicprez. Franz Stanke; sekr. Josefine Protiwinsky, Heinz Legerer jun.; kas. Maria Stanke; konsil. Amalia Brustbauer, Pauline Emberger, Leopoldine Schrefl.

Linz. Kursoj por komencantoj (gvid. J. Mraz), en Fortbildungsschule **(J. Mraz)**, por dungitoj ĉe Poŝto kaj Telegrafoj (senpage gvid. oficdirekt. **Haider**).

Oberpullendorf. S-ano Julio Reiner klopodis aranĝi kurson kaj havis la helpon de fervoraj s-anoj prof. d-ro Görlich, d-ro Pühringer, Eugen Görz, B. Csenár, Rud. Lang kaj E. Strahhofer. Grupo de AEA fondota.

Ober-Pullendorf, 24. jan. okazis fondo de „Esperantista Asocio p. 1. distrikto Ober-Pullendorf". Ĉeestis 60 personoj, aliĝis 43. Elektoj: Prez. prof. d-ro Görlich; vicprez.: Julio Reiner; kas.: F. Kroger, Rud. Lang; protokol.: Strailhofer, R. Wiesinger; komitatanoj: Maurer, Saucine, Pomper. — Oni laŭtlegis la salutleteron de prez. de AEA kort. kons. Steiner, la akompanajn vortojn de kanceliero Schuschnigg (AE I), poste sekvis parolado de prof. d-ro Görlich, kantoj, amuzoj. Koran gratulon, speciale al s-ro Reiner, kiu tiom klopodis.

Salzburg: Bela Zamenhof- kaj Kristnaskofesto okazis la 19. dec. Parolis: prof. Scheierl pri „Vivo de Zamenhof" kaj „E. kaj gepatra lingvo", studkonsil. prof. Mathiaschek el Hallein „Interna Ideo kaj Kristnasko", instr. Fötinger „Kristnasko en infanaĝo, en militkampo, en la familio kaj en la esperantistaro".

Sigmundsherberg. E.-Verein Estonteco havis la 21. 12 sian ĝeneralkunvenon, en kiu direktoro Wolf estis reelektata prezidanto.

Stegersbach. E.-Kurso de fakinstr. Bauer, plejparte instruistoj.

Esp.-grupo, Wels: Novelektoj en ĝeneralkunveno la 12. I.: Prez. Leopold Königsecker, ofic., Wels, Grünbachplatz; vicprez.: A. Mayr, kas. Kurt Mayr, sekr. Rosa Kierner. La meritita ĝisnuna prez. Karl Franz ne plu akceptis la prezidantecon, sed restos simpla membro. Koran dankon al s-ro Franz. — 3 kursoj en Wels.

E.-Soc. „Danubio"-Wien: Ĝeneralkunveno la 25. I. Novelektoj: prez. R. Čech, vicprez. kort. kons. d-ro Heeber, Oskar Popper; Fr. Vasta, Max R. Frey sekr.; B. Selzer, M. Jauernig kas.; A. Denks, Liesl Frey bibl.; estr-anoj: A. Deistler, Irma Ultmann, dir. Feder, d-ro R. Krämer; reviz.: Anna Stowasser, d-ro Engländer. Ĉiun lundon kunveno, 9., Alserstr. 63 a (en la vestiblo d.). Oni decidis resti sendependa.

Katolika Unuiĝo Esperantista, Wien, I., Ebendorferstr. 6/I. ĉiun merkredon de la 18 h.

Kat. Unuiĝo Esp. en Wien: La 31. I. novelektoj kun reelekto de prez. Chiba, vicprez. Siedl kaj baronino Scherpon. La ĝeneralkunsido dankis al prez. de AEA Steiner pro lia ĝisnuna laboro por Esperanto, kiu estis de eksterordinare grava valoro.

Esperanto-Klub, Wien. Ĉiun mardon de 18 h 30 — 19 h 30 E.-kurso, partopreno senpage. Poste ĉiam lumbildparolado, prelegoj, spritaĵoj, kantoj. Gastoj bonvenaj! I., Wallnergasse 6 (en la vestiblo la unuan pordon dekstre, event. sonorigu!). Nia klubo baldaŭ nombros 100 membrojn.

E.-Diservo en Wien, la 21. febr. en la kapelo de Kath. Gesellenverein, VI., Gumpendorferstraße 39. Kantaro po s 1.—, preĝareto po 70 g haveblaj ankaŭ pere de ni.

Aŭstrianoj, Vienanoj vi estas invitataj frekventi Int. E.-Muzeon, Wien, I., Neue Burg, legi tie la gazetaron aŭ librojn (por unu ĉeesto 10 g; s-anoj sen ia subteno senpage!) kaj vi ankaŭ povos pruntepreni librojn ankaŭ per poŝto sub la kondiĉoj de Nacia Biblioteko, al kiu apartenas la E.-Muzeo. Ĉiu uzu la okazon! Ĉiuj estas same akceptataj, ĉar membreco al iu ajn societo ne interesas nin. La gvidisto: Steiner.

Internationale Esperanto-Ligo.
Sitz: England
Hauptdel.: Gustav Weber, Wien, I., Neue Burg

Aliĝu al IEL. Neniu esperantisto restu ekster la mond-organizo, sed kontribuu ankaŭ sian parteton.

Nova delegito: Rudolf Lang, kafejestro, Ober-Pullendorf, Burgenland.

Neue Dienste des Aŭstria Esperantisto.

1. Briefmarkentauschen.

Wir treffen eine Tauscheinrichtung für Briefmarkensammler: a) für Wiener, b) für österreichische Bundesländer.

Sendungen in Heftchen schön geklebt, nur tadellose Stücke, ausgepreist laut Katalog Michel 1937. Schundware ausgeschlossen, Durchschnittswert der Marken eines Heftes mindestens 10 Pfg. Entnommen darf nur zwei Drittel des Wertes der eingelieferten Marken werden. Jene, die nicht genügend Tauschmarken haben, können den Mehrbetrag mit 30 g pro Michelmark ablösen.

Jeder sich Anmeldende sende S 1.— in österreichischen ungebrauchten Briefmarken für die im Laufe des Jahres entstehenden Kosten ein. Dieser Betrag wird am Jahresschluß abgerechnet.

Nur für Bezieher des AE. Ablieferung: Wien, I., Neue Burg.

2. Führungen in Wien.

Ab Februar allmonatlich 2 Führungen. a) Besichtigung von Wien mit Erklärung in Esperanto, b) von Museen, Palästen, Sammlungen, Industrien usw.

Kosten erwachsen ad a) keine, ad b) entweder keine oder nur Regiebeitrag, sehr ermäßigt.

16. Februar um 22 Uhr: Besichtigung des „Das Kleine Blatt", V., Rechte Wienzeile 95.

27. Februar um 15 Uhr: Rundgang in Wien. Treffpunkt vor dem Esperanto-Museum.

Weitere Anregungen erbeten.

V. b. b.

Inter la leteroj, kiujn ricevis nia Federacia Kanceliero el ekster- kaj enlando, ni publikigas jenan de s-ano Tilscher, D. Wagram:

„Permesu, ke ankaŭ mi
milfoje kore dankas al vi.
Viaj belaj vortoj akompanaj
en Aŭstria-Esperantisto estos ne vanaj.
Multaj gutoj faras maron
kaj multaj samideanoj — la grandan esperantistaron.
Mi petegas vin, laboru ankaŭ por nia movado.
Aŭstrio vivu, sub via gvidado!"

Peter Rosegger,

der bedeutende, echt österreichische Heimatdichter, über den Krieg:

„Der Krieg ist kein in natürlicher Leidenschaft verübtes Verbrechen, sondern ein vorsätzlich berechneter Massenmord.

Die schrecklichste Form des Hasses ist der Krieg. In einer Zeit, wo aller Witz der Staaten und Völker darauf hinausgeht, aus Menschen Soldaten, aus Staatsbürgern Kanonenfutter zu machen, ist Tierschutz Ironie."

(Für einen wahren Völkerbund):

Schiedsgericht! Darin liegt die Rettung! Wenn der Krieg, wie man so gern sagt, der Vater großer Tugenden wäre, so müßten die Menschen vor lauter Morden und Brennen schon Heilige und Götter sein. Nein, nicht die rohe Gewalt fördert die Entwicklung, sondern der Idealismus.

Franz Grillparzer, der österreichische Klassiker, sagt sehr kurz und treffend: „Nationalität ohne Humanität ist Bestialität."

Peter Rosegger,

la eminenta, vere aŭstria hejmlanda poeto pri la milito:

„La milito ne estas krimo, farita en natura pasio, sed intence celita amasmurdado.

La plej terura formo de malamo estas la milito. En tempo, en kiu la esenca celado de la ŝtatoj kaj popoloj konsistas en tio, igi el homoj soldatojn, el civitanoj nutradon por la kanonoj, protektado de la bestoj estas ironio.

(Por vera Ligo de Nacioj):

Arbitracia Kortumo! Jen la solvo! Se la milito, kiel oni tiel ofte diras, estus la patro de grandaj virtoj, la homoj pro la multaj murdado kaj bruligado jam devus esti sanktuloj kaj dioj. Ne! Ne la brutala forto akcelas la evoluon, sed la idealismo!

Franz Grillparzer, la aŭstria klasikulo, diras tre koncize kaj trafe: „Naciemo sen humaneco estas bestialeco."

Trad. Walter Mudrak.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.